

Unua numero de J. P. R.

Doublet

G.P.

11 FÉV. 1956

Aboni!

ESPERANTO

KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Aperas monate sub la aŭspicio de la
FRANCA ASOCIO DE ESPERANTISTAJ EDUKISTOJ
(G. E. E.)

Redakto - Sekretario :

D-ro Andreo ALBAULT
11, rue des Feuillants
Toulouse (Francio)



Eldono - Direktoro :

H. MICARD, Emerita Instruisto
Epineux - le - Séguin (Mayenne)
Francio

1-a Jaro
Numero 1
JANUARO
1955

Jara abono : 400 fr. fr., pagenda en Francio al
Edmond BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.), Francio.

Post-ĉek-konto : 143-867 Nantes ;

au al la landaj perantoj kaj delegitoj de U.E.A.



?! 1956

INFORMOJ KAJ KONSILOJ AL KUNLABORANTOJ

La redakcio prenas la rajton, se necese, iomete aliigi la frazojn kaj terminojn, se la verkinto tion ne aparte malpermesis. (En ĉi-lasta okazo, estas konsilinde reteni kopion por faciligi koncernen korespondon). Interalie, por la landnomoj estos uzataj la i-formoj, kiuj ja atendus, por definitive ĝeneraligi, nur etan fingrosignon de la Akademio; tamen, se aŭtoro eksplicite petas tion, ni lasos la u-formojn en lia kontribuo.

Terminoj ne troveblaj en la ĝenerale uzataj vortaroj, precipe en la Plena Vortaro, estu klare difinitaj (ĉu per piednoto, ĉu per aparta artikoleto, ĉu per resendo al fonto, se tiu estas trovebla). Antaŭ ol enuzigi tian terminon, provu ĝin eviti, studu ĉu ĝi vere utilas kaj donu viajn argumentojn al la redakcio.

(?) La artikoloj, komunikoj, informoj, ktp, se eble, estu tajpitaj sur unu flanko de la folioj, kun unulinia interspaco inter la linioj kaj kun sufiĉa marĝeno maldekstre. Ĉiokaze, ĉiu litero de manuskripto estu klare legebla: la presisto ne estas esperantisto.

Antaŭ ol sendi al ni tradukon de artikolo estu certa ke ĝi ne estas protektita de « Kopirajto » (ĉiam indikita) aŭ petu apartan permeson.

LA REDAKCIO.

Informoj el niaj Asocioj

Ni opiniis ke la aperigo de la jenaj informoj utilos al niaj legantoj.
I.L.E.I.

Funkciuloj por la periodo 1955-58 :

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, 70, Av. Victor-Ségoffin, *Toulouse*, Francio.

Sekretario, Kasisto, Gvidanto de Centra Oficejo : F-ino Violet C. NIXON, 183, Woodlands Park Road, Bournville, *Birmingham*, 30, Anglio.

Konsilantoj : S-roj HEITMÜLLER, SVANTESSON, TACCANI.

Membro-Asocioj :

Aŭstrio, Britio, Francio, Germanio, Italio, Suomio, Svedio.

Aktivaj reprezentantoj en aliaj landoj :

Aŭstralio, Belgio, Danlando, Irlando, Izraelo, Japanio, Jugoslavio, Kanaŝia Insularo, Maroko, Norvegio, Portugalio, Urugvajo, Usono.

G.E.E. (800 anoj) (franca asocio)

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, Licea Lingvo-instruisto (adreso supre).

Generala Sekretario : S-ro F. THÉBAUD, C.C. Jeunes filles, *Caudry* (Nord).

Kasisto : S-ro E. BIDORT, 6, rue de la Paix, *Baugé* (M.-et-L.).

S.B.E.T. (191 anoj) (brita asocio)

Prezidanto : S-ro E. K. OSMOTHERLY, 118, Lathom Road, *London* E6.

Sekretario-Kasisto : F-ino Violet C. NIXON (adreso supre).

INFORMOJN pri aliaj landaj edukistaj asocioj ni volonte publikigos.



ESPERANTO KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Redaktoro : D-ro A. ALBAULT, 11, rue des Feuillants, Toulouse, Francio.

KIAL NOVA ORGANO ?

Dum longa tempo la politikaj unuoj de la mondo vivis aparte, preskaŭ rilate, en pli malpli granda izolo. Sed rezulte de teknika progreso kaj spite la persista postsigno de stato kadukiĝinta, nia mondo tendencas al unuecigo de moroj kaj kutimoj.

Trans naciaj limoj kaj lingvaj baroj oftas pli kaj pli jen multopa jen individua rilatado; etendiĝas al la tuta mondo problemoj, kies racia solvo ne plu troveblas en malgranda kadro de unu lando.

Asocioj inter- kaj super-naciaj multiĝas diversspece. Ankaŭ pedagogoj kaj instruistoj kreis siajn, sentinte bezonon al universala studo pri la edukado, kiu ja koncernas ne parton sed tuton de la mondo, kaj estas komune kaj harmonie organizenda en aliformiĝinta universo.

Sed tiu kreskado de vivaj interrilatoj super landlimoj akriĝas la embarason, kiu devenas el lingva diverseco, kaj pli urĝa sentigas la bezonon pri unulingva tribunio, kie estos debatitaj pedagogiaj demandoj.

El tiu neceso devenas la nuna provo lanĉi revuon, kiu per la jam tre disvastiĝinta Lingvo Internacia havos sian internacian utilon pri la grava temo eduki kaj instrui. Ni esperas doti internacian legantaron per organo, kiu ĉiunmonate studos la proprajn demandojn de gepatroj, instruistoj kaj iliaj kunlaborantoj, konigos spertojn kaj rimedojn por sukcesi en la edukado.

Pro nia provo eble surpriziĝos ricevintoj de tute juna « Instruista Letero », kaj ili ektimos pri bedaŭrinda konkurado inter ambaŭ eldonaĵoj. Ili trankviliĝu. Neniu rivaleco signas la duoblan naskon, kiu rezultas el diversflanke kaj eskaŭ samtempe komencitaj klopodoj, kiuj paralele kaj sinsekve sukcesis.

Cetere kvankam najbaras la tereno por ĉiu, ambaŭ gazetoj similas nek laŭcele nek laŭteme. « Instruista letero » estas informilo, kiu necesiĝis por la membroj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, dum Esperanto kaj Kulturo estas eksterasocie destinita al pli larĝa publiko, kaj volonte akceptos materialon de I.L.E.I., ekzemple pri la temoj debatitaj en ties kunvenoj.

Amike interrilatas aktivaĵoj de ambaŭ gazetoj. Se la sperto montrus, ke unu el tiuj ĉi ĝenas la alian, ni povas esperi, ke okazos interkonsento pri la alprenenda plej bona solvo.

Ankaŭ vi, karaj legantoj, havas respondecon pri la sorto de nia provo. Subtenu nin per propra abono, per diskonigo de unuaj numeroj kaj instigo al abonado.

Jeanne DEDIEU,
prezidantino de
Internacia Ligo de Esperantistaj Edukistoj
kaj de ties franca membro G.E.E.

INFORMOJ

CAHIERS PEDAGOGIQUES

— dezirus publikigi artikolojn el diversaj landoj dediĉitajn al iu problemo, institucio, iniciato, metodo, reformo, ktp, aparte karakteriza por la koncerna lando ?

— dezirus ricevi tiajn artikolojn pri edukoj kaj instruoj en la duagradaj lernejoj, el la tuta mondo (ekster Francio).

— dezirus ricevi viajn kontribuojn antaŭ la 15-a de Februaro 1956 (por aperi en Aprilo) je la adreso :

François GOBLOT, 7, rue Jean-Marie Duclos, Lyon 5^e, Francio (ne estas esperantista).

INSTRUISTA LETERO

Tiel titoligas informilo kaj kunligilo por aktivaj geinstruistoj eldonita de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.), je kosto de 4 svedaj kronoj por 10 sinsekvaj numeroj.

Redaktas kaj ricevas abonojn S-ro Oskar SVANTESSON, Skonertgatan 1, Göteborg Vr, Svedio. Oni povas pagi per postmandato (postĝiro 62 252), per internaciaj respondkuponoj aŭ per la premio-kuponoj de Univerŝala Ligo (po O, 35 svedaj kronoj por 1 kupono).

La unua numero jam aperis dum somero kaj estis sendita al pluraj centoj da instruistoj. La dua kaj sekvantaj iros al abonintoj. Tuj abonu, ĉar ne estos eble ricevi jam aperintajn numerojn.

I.L.E.I. intencas publikigi la nomojn kaj bezonojn de aktivaj lernejoj en speciala numero, por ke ni plifaciligu rilatojn inter ili.

J. DEDIEU.

INFORMOJN koncerne la aperon, ktp, de la diversaj landaj fakbultenoj, ni volonte publikigos.

ENKETU PRI LERNEJOJ !

De nun estas dezirinde :

— kolekti precizajn detalojn pri lernejoj kie oni instruas esperanton, kun :

— aĝo kaj nombro de lernantoj, nombro kaj daŭro de lecionoj, ĉu post- aŭ dum-lernejaj horoj ;

— fari statistikon pri geinstruistoj esperantistaj, kun detaloj pri lernejo, fako, ktp.

Tio ebligas al ĉiu havi aktualajn informojn.

J. DEDIEU.

KORESPONDU !

Koresponda centro de I.L.E.I. Sajne zorgas ĉefe pri korespondopetoj de instruistoj mem. aŭ kolektiva). Sin turni al : F-ino TEGG, 258 Victoria Road, Ruislip, Middlesex, Anglio.

Korespondo-servo de G.E.E. Sajne zorgas ĉefe pri korespondopetoj de instruistoj mem. Sin turni al : S-ino Jeannine LE GOFF, avenue du Général de Gaulle, Les Andelys (Eure), Francio.

El Ĉekoslovakio 25 novebakitaj esperantistoj (13-ĝis 35-jaraj) deziras korespondi. Adreso : Závodni klub SVITAF, Esperanto-grupo, Malé Námesi, Svitavy, Ĉekoslovakio.

Korespondo-Servo de Germana Esperanto-Junularo. Junuloj ĝis 25-jaraj, kiuj deziras korespondi kun germanaj amikoj, indiku siajn nomon, adreson, sekson, aĝon, profesion, esperantan lingvoscion kune kun siaj deziroj. Adreso : S-ro Hans Best, Untere Mühlaustrasse 218, Mannheim, Germanio.

PARTOPRENU LA PASKAN LERNEJON DE S.B.E.T.

La Brita Edukista Esperanto-Societo organizas de la 2-a ĝis la 7-a de Aprilo 1956, post la kongreso de la Brita Esperanto-Asocio sian kutiman Paskan Lernejon ĉe High Tor Matlock.

Ĝi okazos en bela, famkonata regiono en Derbyshire dum preskaŭ unu semajno kun programo de konversaj rondoj, prelegoj, eskursoj kaj societaj aranĝoj.

La kosto estas 21 ŝilingoj po-tage.

Petu pliajn detalojn de F-no O. RO. THAM, 14, Wensley Road, Stockton-on-Tees, Co. Durham, Britio (aldonu guste stampitan respondkuponon).

LA JARA KONGRESO DE S.B.E.T....

Jus okazis en Londono, la 30-an kaj 31-an de Decembro. Estis en la tagordo du interesaj diskutoj : « La loko de esperanto en la lerneja programo » kaj « Esperanto kaj mondproblemoj ».

Ni esperas publikigi detalojn en unu el la venontaj numeroj.

LA JARA KONGRESO DE G.E.E...

Okazos la tutan sabaton, la 7-an de Aprilo 55, en nia Kulturdomo, Kastelo de Grésillon (pr : grezilion').

Antaŭ la kongreso de la 27-a ĝis la 6-a de Aprilo, okazos « restado por bindado », destinita al ĉiuj, kiuj deziras iniciigi en tiun arton.

Ni ĉi-tie menciuj ke la Jarfino kaj Novjara tago estis festataj en la Kulturdomo kun programo de kino, muziko, danco, ludo kaj prelego. Ni eble aperigos detalojn februare.

« NIA VOĈETO » estas bona bulteneto, ro-neotipita kaj bilda, por junaj infanoj. Sin ŝirmas sub ŝildo de S.A.T. Abonprezo : 120 fr. Fr., triono de dolaro aŭ 4 respondkuponoj al S-ino P. Louis, 96, rue de Nabeé, Nancy, Francio (Poŝtkonto : 773-60 Nancy).

« INFANOJ DE LA MONDO » : La Brito-Irlanda volumo aperis fine de junio. Oni scias ke tiu verko japanlingva estas kolekto de infanaj verkaĵoj el la tuta mondo. Multaj esperantistoj kontribuis per esperantigo de la tekstoj.

LA REDAKCIO

serĉas la jenajn terminarojn :

— BENNEMANN. Terminaro Pedagogia kaj Psikologia.

— TRARBACH. Teknika Vortareto de Pedagogio, Logiko, kaj Psikologio.

— KAMARYT. Filozofia Vortaro. Proponojn sendu al D-ro A. ALBAULT, 11, rue des Feuillants, Toulouse, Francio. (Estos kompenso).

POR LA PRAKTIKANTOJ

ENKONDUKO. — La ĉi-suba leciono estas la 14-a de serio titolita « Por la Praktikantoj » kaj entenanta 20 lecionojn.

La celo de la verkinto estas havigi al la gelnantoj, kiuj posedas la elementojn de nia lingvo, materialon por daŭre labori kaj ankaŭ frazojn kaj tekstojn, kiujn ili povos uzi en la ĉiutaga vivo, skribe aŭ parole. Kelkfoje oni posedas grandan vorttrezoron sed oni ne kapablas konstrui frazojn per tiuj vortoj.

Ĉiu leciono konsistas el kvin partoj : ilustritaj frazoj, simpla teksto, teksto el esperanta verko, rimarkoj, ekzercoj.

La ilustritaj frazoj estas bazo por konversado pere de vortoj jam akiritaj.

La unua teksto kompletigas la antaŭajn frazojn per aliaj, kiuj uzas jam studitajn gramatikajn formojn kaj novajn esprimojn.

La dua teksto prezentas al la lernantoj literaturan verkaĵon. Ĝin kelkfoje ekvas klarigoj.

La rimarkaj, ĉefe gramatikaj, atentigas pri gravaj kaj specialaj punktoj de la gramatiko.

La ekzercaro utiligas la nove akiritan vortan kaj gramatikan materialon. La demandoj rilatantaj al la dua teksto, estas nur bazo por konversado kaj povas esti pli multaj en kurso.

La antaŭaj 13 lecionoj pritraktis la vivon en la domo, en la lernejo, en la vilaĝo, promeno tra la kampoj, laŭlonge de la rivero, ktp... La tekstoj tre simplaj ĉe la komenco iĝis pli kaj pli malfacilaj.

Kiel gvidanto povas uzi tiun kurson ? La ĉefa punkto estas ne forgesi, ke oni devas paroligi la gelnantojn kaj uzigi al ili la akiritan materialon.

1. Paroligi ilin pri la ilustraĵoj. Ekz. : Kio estas la laboro de la policisto ? Kiel la policisto estas vestita ? ktp...

2. Malrapide kaj bonakcente legi la unuan tekston. Peti klarigojn de kelkaj esprimoj, kaj paroligi pri tiu teksto per simplaj demandoj.

3. Legi la duan tekston. Klarigi la malfacilajn frazojn aŭ vortojn. Legigi la tekston (po kelkaj linioj al ĉiu lernanto).

Interparoli kun la lernantoj ne nur pri la teksto mem sed ankaŭ pri tiu aŭ tiu-ĉi esprimo, pri la intenco de la aŭtoro, ktp., fakte okazigi priliteraturan kaj prigramatikan interparoladon. Poste tradukigi la tekston ĉiam serĉante la plej taŭgan esprimon. Se eble interesigi la gelnantojn pri la verko mem, el kiu estas la teksto eltirita.

4. Farigi la ekzercaron. Se tempo mankas oni povas konsideri tiun parton, kiel farotan (almenaŭ farindan) hejme.

Ĉar necesas paroligi ĉiujn lernantojn, la profesoro, kiu instruas grandan nombron da lernantoj estos eble devigata studi ĉiun lecionon poduone.

La verkinto de tiu kurso tre ŝatus koni la opinion de la legantaro (kursgvidantoj kaj lernantoj). Sendu viajn sugestojn al la redaktejo. Ankaŭ kritikoj helpas.

Pierre BABIN.

En granda urbo

1-a teksto. — Proksime de la vilaĝo, kie loĝas la geonkloj de Petro, granda urbo kuŝas en la valo. Dezirante aĉeti ŝtofon kaj ŝuojn, la onklino iras tien kun sia nevo. Largaĵ helaj stratoj vivplenaj kondukas al la centro de la urbo. Estas malfacile loki la aŭtomobilon. Feliĉe specialaj haltadejoj tie kaj tie-ĉi proponas liberajn lokojn. Onklino ĉiam sekvata de

sia nevo eniras grandan magazenon, kie oni povas aĉeti preskaŭ ĉion dezireblan. La ŝtofofako kuŝas sur la tria etaĝo. Ili preferas la rulŝtuparon ol la lifton. Petro neniam supreniris per tia aparato kaj iom timas. Sur la tre vasta tria etaĝo kuŝas multaj diversaj fakoj. Grandaj pendantaj avertiloj atentigas la aĉetontojn pri la diversspecaj aĉeteblaĵoj. Onklino

alparolas junan vendistino : « Fraŭlino, mi petas. Mi deziras lanan ŝtofon por fari mantelon... Bonkvalitan, kompreneble. » — « Kiun koloron vi deziras ? » — « Mi ne jam fine elektis. Eble blua... aŭ flava. Bonvole montru al mi viajn bluajn lanaĵojn. » Preninte rulaĵon da ŝtofo de breto la junulino disvolvas iom el ĝi por montri la kvaliton kaj la koloron. « Estas mia plej bonkvalita lanaĵo », ŝi diras. « Jes, sed ĝi ŝajnas al mi tro malglata. Mentru al mi flavan, mi petas. » Post longa interparolado onklino fine prenas... brunan ŝtofon. « Nun ni iru al la ŝufako. » Sciigite pri la deziro de la onklino la vendistino demandas : « Kiajn ŝuojn vi deziras ? » Kaj ŝi demandas pri la mezuro. Feliĉe la ŝuoj estas por la onko. Do onklino ne surpravas ilin kaj rapide elektas. Petro komencas suferi pro tro longa starado. « Eble vi malsatas, Petro ? » — « Jes onklino, mi plezure manĝos iomete. » En la kafejo ili servigas al si teon por onklino, fruktosakaĵon por Petro kaj kukojn por ambaŭ. Lacegaj ili fine eliras el la magazeno.

KLARIGOJ. — *Magazeno* : 1° Ejo, kie oni konservas komercaĵojn ; 2° (en la supra teksto), tre granda moderna vendejo.

Fako : 1° Aparta dividaĵo de meblo aŭ kesto ; 2° (en la supra teksto), aparta branĉo de scienco. arto, komerco, ktp.

2-a teksto. — Lumo plenigas la straton Lumo per mil lanternoj saltetas tra spegula malseka pavimo. Lumo rebrilas de fenestregoj. Kaj en ĝi glitas sennombraj homaj siluetoj. Fernanda sentas ĉion kvaŝaŭ en sonĝo. Antaŭ ŝiaj larmoplenaj okuloj disfluas ĉio trembile.

La strato, la strato ! Ĉe ĉiu angulo ŝtelatendas la aventuro, antaŭ ĉiu elmontreja fenestro, antaŭ la elmetita bildaro de la kinoj, ĉe ĉiu haltejo de la tramoj kaj aŭtobusoj, se oni nur havas la kuraĝon ne rifuzi la brakojn de ĉi tiu aventuro... La strato enhavas por ĉiu ion, ĝi havas mil logajn voĉojn kaj mil aŭskultemajn orelojn...

Fernanda iras kaj iras. Ŝi scias precize, ke ŝi estas multe tro timema por komenci aventuron. Senhelpe ŝi staras antaŭ elmontrejo kaj fikse rigardas longe en la vizaĝon de manekena pupo, kiu ridetas moke kaj malvarmete. Poste ŝi rigardas la filmbildojn ĉe la kinoenirejo kaj pripensas, ĉu eniri aŭ ĉu iri al dancejo, sed tuj ŝi forĵetas ĉiun planon. Estas ja sence, ŝi scias bone, ke ŝi neniam kuraĝus iri sola al dancejo...

...Jus la montrilo de la horloĝo, pendanta en la halo, ekmarŝis sur la dudektrian horon ! La granda turnpordo moviĝadas pli kaj pli dormeme. La hotela vestiblo kuŝas nunhore, kiel malgranda silenta insulo, ĉirkaŭ ĝi muĝas ondar : la strato, kiu rapideme preterglitas kun fantomaj lumoj kaj obtuza bruoj post la altaj fenestroj, — dekstre post la vitraj pordegoj, la « Palais de Dance », kie ĝis la tria matene ludas por danco la hipermoderna ĉina orkestro, — maldekstre la koridoro al la restoracioj, la luda klubo kaj la palma ĝardeno.

(El « Mr Tot aĉetas mil okulojn », originale verkita de Jean FORGE).
KLARIGOJ. — *Rebrili* : lume speguliĝi.
Stelatendi : kaŝe atendi por forkapti.

RIMARKOJ

1. — *Preferi... ol* : Kelkaj esprimoj aŭ vortoj subkomprenigas komparon inter du personoj, bestoj aŭ objektoj kaj eĉ situacioj. Tial oni uzas « ol » antaŭ la dua parto de la komparo.

Aliaj similaj formoj :

Interkonsento *prefere ol* milito.

Vi faris taskon tute *alia ol* tiu, kiun mi petis vin fari.

Mi aĉetos la *saman* libron, kiel vi.

Li *konsideras* sian patron, kiel kamaŝradon.

2. — « *EBL* » : Tiu sufikso montras, ke io povas esti farata. Kiel aliaj sufiksoj ĝi povas esti uzata, kiel memstara vorto (ebla, ebligita, eble, ebleco).

Kelkfoje oni ne diferencigas la « ebl- », « ind- », « ot- » kaj « end- » formojn.

« Ebl » montras, ke io *povas esti* farata ;

« Ind » montras, ke io *meritas esti* farata (vidu 11-an lecionon) ;

« Ot » prezentas sencon de futuro. « Io farota » estas io, kion oni *faros*, kion oni *intencas fari*.

Ekz. : Io farinda ne estas ĉiam farebla.

Io farota ne estas ĉiam farinda.

La nove oficialigita sufikso « end » montras ke io *devas esti* farata. (Oni ĝis nun ofte uzis « ot » en la signifo de la nova « end »).

3. — Jean FORGE (pseudonimo de Jean FETHKE, estas pola filmreĝisoro kaj nacilingva aŭtoro. Li skribis esperantling-

ve : « Abismoj », « Saltego trans Jar-miloj » kaj « Mr Tot aĉetas mil okulojn ». Li ankaŭ verkis la esperantlingvan parolon de la germana filmo « Morgaŭ ni komencos la vivon » prezentita en 1934 dum la U.K. en Stokholmo.

EKZERCOJ

1. — *Demandoj pri la 1-a teksto :*

— Kial la onklino de Petro iras al la urbo ?

— Ĉu la onklino povas facile loki sian aŭtomobilon ?

— Ĉu Petro kaj lia onklino supreniras per la lifto ?

— Kiel la aĉetontoj scias, kie ili trovos, kion ili deziras ?

— Kion Petro kaj lia onklino faris antaŭ ol eliri el la magazeno ?

2. — *Demandoj pri la 2-a teksto :*

— Klarigu la 6-an frazon : « Antaŭ siaj... trembile. »

— Ĉu Fernanda iras en la kinejon aŭ en la dancejon ?

— Kial ŝi ne iras al dancejo ?

— Kial Jean Forge komparas la vestiblon kun insulo ?

— El kio konsistas hotelo ?

3. — *Konstruu* frazojn uzante la formojn donitajn en la 1-a rimarko : (prefero... ol, alia... ol, ktp).

4. — *Klarigu* la jenajn vortojn : « haltadejo », « aĉeteblaĵo », « preninte », « sciigite », « elmetita ».

5. — *Verkaĵo* : Vi deziras tranokti en hotelo. Priskribu la konstruaĵon. Diru kion vi devas fari por havi ĉambron. Vi vespermanĝas antaŭ ol enlitiĝi. Kion vi manĝas ? Kiel vi estas servita ?

EKZERCOJ DE LA 13-a LECIONO

1. — *Demandoj* : Ne, Ne plu estis neĝo sur la kajo de la stacidomo. Ĝi estis forbalaita.

— Per glitveturilo oni povas veturi sur dika tavolo de neĝo.

— Granda fajro gajigas ĉambron ĉar ĝia dancanta lumo vivigas la objektojn, kiuj ŝajne moviĝas sur la mebloj, kaj briligas ĉiujn glatajn surfacojn.

— La nigraj makuloj sur la blankaj deklivoj de la montoj estas senneĝaj lokoj sur la krutegaĵoj. La vento forblovis la neĝon de sur tiuj rokoj.

— Elektrejo estas speco de uzino, kiu produktas elektran kurenton.

2. — *Demandoj* : La vento formas la glaciajn turojn kaj murojn fendante kaj polurante la glaciason.

— Oni najlumas la ŝuojn por surgrim-

pi rokojn ĉar glataj plandumoj glitis sur la rokoj. La najloj eniĝas en la malglataĵojn de la rokoj.

— Por grimpi sur glacia surfaco oni uzas speciale najlunitajn ŝuojn kiuj portas 5-centimetrojn longajn najlegojn.

— Oni enigas la tuboformajn glacinajlojn per martelo en la muron kaj tra ilia feroringo oni trapasigas ŝnuregon.

— Kutime promeno okazas laŭ pli malpli ebena vojo aŭ tra kampoj. Sed kiam oni parolas pri rokoj surgrimpotaj la vorto « promeno » estas nur relativa.

3. — La aŭtoro uzis tie la akuzativon ĉar la vorto « promeno » subkomprenigas movon al loko aŭ en lokon.

4. — La aŭtoro uzas la U-formon ĉar li rekte alparolas aŭdantaron kaj invitas ĉiujn partopreni la « promenon ».

5. — Tiuj verboj konsistas el prepozicio uzata, kiel prefikso kaj el verbo : surgrimpi = grimpi sur, surmeti = meti sur...

REZOLUCIO DE I.L.E.I. ĈE LA 40-a UNIVERSALA KONGRESO EN BOLONJO (30 Jul - 6 Aug).

Ĉi-tiu kunveno de 60 instruistoj el 13 landoj, diskutinte Edukon por Internacia Interkomprenigo.

1). deziras atentigi ĉiujn instruistajn organizaĵojn pri la rezolucio de Unesko, la 10-an de Decembro 1954, kiu agnoskis la rezultojn atingitajn de esperanto por la proksimigo de la popoloj de la mondo, kaj esprimis intereson pri la evoluo de esperanto-uzado en scienco, eduko kaj kulturo.

2). opinias, ke en la lingvo vivas la spirito de la uzantoj kaj ke esperanto kun longa tradicio de internacia uzado esprimas kaj kreskigas la senton de hom-unueco.

3). alvokas la instruistojn de la mondo lerni kaj instrui esperanton por ke internacia vivo pli rapide realiĝu.

(Ĉiu estas afable petata konigi, en inda maniero, tiun rezolucion al instruistaj organizoj. Krome, jen unu el la rimedoj montri ke ni ekzistas !).


SOLVO DE LA KRUCVORTOJ N° 2

Horizontale. — 1. Vojkruciĝo ; 2. Ebu-ro, aren ; 3. Luno, krano ; 4. Osama, odom ; 5. Co, ejo ; 6. Ktp, At ; 7. Paro, italo ; 8. Ekipi, igap ; 9. Depo, erare ; 10. Ostracismo.


Vertikale. — 1. Velocipedo ; 2. Obuso, akes ; 3. Juna, kript ; 4. Krom, Topor ; 5. Ro ; 6. Ec ; 7. Caroj, tiri ; 8. Irado, agas ; 9. Ĝeno, alarm ; 10. Onomatopeo.



Policisto prizorgas la trafikon.




La lumsignalo estas ruĝa; la aŭtoj atendas.



La aŭtoj ne rajtas haltadi ĉe bushaltejo.




Reklampaneloj kaŝas konstruejon.




Florvendistino staras ĉe la enirejo al la subtera fervojo.



Magazenoj ofertas multspecajn komercaĵojn al la preterpasantoj.



Kelnero alportas trinkaĵojn al klientoj sur la antaŭkafejo.



En la antaŭurbo staras multaj fabrikoj kaj uzinoj.

POR LA PROGRESINTOJ

En la tendo de majstro Baltazar

BAGHY estas unu el tiuj elstaraj figuroj kiuj, post la unua mondmilito donis al nia movado freŝan impulson, ne nur per sia instruado de la lingvo en diversaj landoj, sed precipe per sia literatura agado. Siajn unuajn poemojn li jam verkis dum sia militkaptiteco en Siberio. Krom kelke da poemvolumoj li verkis ankaŭ novelojn kaj romanojn kies romantika fantazio intime kunfandiĝas kun la liriko de la poeto. Jen ekstrakto de novelo « *Printempo en la aŭtuno* », en kiu li pentras la naskiĝantan amon de du junaj georfioj.

Baltazar estas foiraŭguristo; juna gimnaziano, el simpla amuzo kaj sciivolo, eniras lian tendon por sperti lian divenkapablon.

La studento denove sentis, ke la du magnetaj okuloj kroĉiĝas (1) en lian rigardon (2). Li jam pentis pri la antaŭa neglekta sinteno, ĉar la silento nun tre ekkuŝis sur lian bruston (2). Li volis ekparoli, sed ne povis. Kvazaŭ lia lango estus paralizita. Subite lia aŭdkapablo akriĝis. Li perceptis voĉojn, kiujn ĝis nun li ne aŭdis. Tute proksime al li malforta besta voĉo plendis. Sian rigardon li turnis tien. Jes, ja! La kobajoj de majstro Baltazar. Ili gruntetis ĉirkaŭ la skatolo de la horoskopoj. Lia liberiginta rigardo povis klare distingi la objektojn de la mizera tendo. Tablo, kelkaj seĝoj kaj primitivaj benkoj. En iu angulo sur la tero modestadis (3) du pajlosakoj. Sur unu el ili kuŝis granda bruna maso, iel homforma. Sed eble, ke nur la hazardo formis homajn konturojn el la ĉifonoj, etitaj unu sur la alian.

La voĉo de majstro Baltazar tiris for lian rigardon de tiu strangforma ĉifonmaso.

— Vi estas prava... Mi devas scii ja, kion vi deziras. Mi devos legi tion el via rigardo (4)... Vi staras nun sur la sojlo de la Vivo. Vi scivolos ne pri la pasinteco, sed pri via estonteco. Vi estas fortika, preta por la lukto. Vi atendas multon, tre multon de la Vivo. Vi estas prava. La sola rajto de la juneco: atendi multon de la Vivo... Do, vi deziras koni vian estontecon, ĉu ne?

La voĉo de la foira komedianto ŝtelis sin (5) en la animon de la studento. Tiu voĉo estis milda, trankvila, muziksona. Ne tia li prezentis al si la voĉon de la

aŭguristo (6). Li pensis, ke li trumpetsonne knaros ĉiaspacajn sensencaĵojn al li. Bone amuziĝinte pri tio li revenos hejmen kaj kun laŭta ridego rakontos pri la dudekfilera arlekenado (7). Vere, li seniluziĝis pri majstro Baltazar. Tamen nun li konjektis, ke tuj li ricevos por sia bagatela dudekfilera monero ion, kio eble efikos ĝis lia vivofino. Tiu ĉi penso tremigis lian koron. Timo kaptis lin pro la estonteco. Eble la majstro aŭguro (8) ion teruran. Ne, li ne volas koni la estontecon. Kial? Li ja ne povas aliigi la sorton. Li parolu nur pri liaj estanteco, pasinteco, nur ne pri la estonteco! Krome, se li parolos pri la pasinteco, facile estas kontrolebla la scikapablo de la majstro.

(J. BAGHY — *Printempo en la aŭtuno*).

LINGVAJ RIMARKOJ

(1) *Kroĉiĝas* : la uzo de la prezenco signas la samtempecon de la verbo kun la ĉefpropozicia verbo.

(2) *En lian rigardon, sur lian bruston* : la akuzativo akcentas la metaforan almovon de la verboj.

(3) *Modestadis* : notu la esprimkapablon, kiun donas al la lingvo tiu senpera verbigo de adjektiva radiko.

(4) *El via rigardo* : rimarku la metaforan elmovon signitan per la prepozicio EL, tute malan de la almovo signita sub (2).

(5) *Stelis sin en la animon* : ŝovis sin, penetris en la animon.

(6) *Ne tia li prezentis al si...* : notu la lokadon de la objekta predikativo komence de la frazo por ĝin akcenti.

(7) *Dudekfilera arlekenado* : senpera verbigo de substantiva radiko, ree substantivigita per la sufikso ADO. Filero estas malgranda hungara monunujo.

(8) *Aŭguro* : tiu verbo ne ĝuste respondas al la franca « augurer » kiu nun signifas nur : *tiri de io antaŭsenton*. Ĝia signifo estas : *eldiri estontecon pere de pli malpli magiaj rimedoj*.

Gerhard RAUH

FORMU HOMOJN : DONU LIBERON

Gehard RAUH (13a Neustadt/Aisch, Germanio) estas bavaria unuagrada lernejestro, kiu vigle propagandas kaj verkas en diversaj pedagogiaj revuoj por la Freinet-aj teknikoj ne nur en Germanio sed ankaŭ en aliaj landoj (i.a. : Belgio, Suomio). La originalo de la jena artikolo aperis franclingve en « Education populaire » (Belgio), n° de Junio 1955.

Antaŭ nelonge mi legis kun granda intereso la verkon : « Psikanalizo de normala homo », de D-ro RICHARD (eld. Payot, Lausanne). Interalie, la aŭtoro pritraktas la demandon ; « Kiu estas normala ? Kie estas la limo inter normalo kaj nenormalo ? »

Eĉ supozante, ke vere normalaj homoj ne ekzistas, ni parolas pri nenormaluloj, kiam la sinteno de tiuj homoj diferencas tiun de aliaj. Ni observu en niaj klasoj, eĉ supraĵe, ni vidas gelernantojn, kies sinteno diferencas tiun de la aliaj. Se niaj observoj iĝas sistemaj, se ni vizitas la gepatrojn nia prijuĝo plifirmigas.

Kiel instruisto, se mi sufiĉe observis, se mi konstatis, kiu estas normala kaj kiu ne estas, tiam komencas mia laboro. Ĉar nun mi devas demandi : *Kiel kuraci ?*

Estas neeble toleri, ke ĉiam Ursula ĝenu per sia neatento kaj babilemo, ke Petro, estu timoplena (jam en la antaŭa klaso oni nomis lin « la tremanto »), ke Johano superu siajn kamaradojn per sia aroganteco.

Mi devas krei atmosferon, kie unuflanke la infanoj ne plu sentas sin ĝenataj, kaj kie aliflanke la *incitiloj* al aktiveco, al fruktoplana laboro povas agi. Antaŭ ĉio la timo devas formalaperi el la lernejo. Pro tio : *Ne taksu la laboron !*

En objektiva laboro, laŭdoj kaj kritikoj estas tute superflujaj. Tion ni ĉiam ree rimarkas, je la fino de la lerneja jaro, kiam la infanoj vidas, ke la instruisto donas poentojn ; la lerneja laboro pli kaj pli iĝas subjektiva, ĵaluzo kaj envio naskiĝas. Mi asertas, ke *taksante la laboron, ni agas kontraŭ-pedagogie.*

Neniajn hejmotaskojn ! Vivi dum kvar aŭ ses horoj po-tage en atmosfero plena de lerneja spirito sufiĉas al 20-jarcenta infano por instruiĝi. Kial ŝarĝi per laboro infanon, kiu ĵus finis sian lernejtaĝon ? Kiam la lernejpordoj fermiĝis malantaŭ li, li bezonas libertempon por ekspluati la mondon per siaj propraj fortoj. Infano, kies iniciato estas malhelpata, malbone dormas, kaj matene li ne iras al la lernejo kun ĝojo.

Se ni ne plu « instruistos », se ni havos pure homan sintenon antaŭ niaj gelernantoj, se ni donos al ili *liberon*, ĉie kie taŭgas, tiam ni « vivos » ; iom post iom, la vivo envenos en nian klason, la nenormalaĵoj malaperos, la lerneja vivo iĝos normala.

Jen ekzemplo : en la sesa klaso mi akceptis lernantinon timoplenan. Ŝi ne kuragiĝis paroli ; la rezultoj de ŝia laboro ĉiuvidepunkte estis malbonaj. Ŝi malbone dormis, ofte kriis dormante, ne sufiĉe manĝis. Pro misformiĝo de la vertebroj, ŝi vizitis kuraciston, vane. Nun ŝi eniris klason, kie regis *libero*. Dum la kalkuleciono ŝi laboris sola, tre tre malrapide, laŭ la propra ritmo. Mi helpis ŝin nur kiam ŝi petis mian helpon. Ŝi mem elektis la librojn, kiujn ŝi volis legi. Ŝi desegnis — tre malbone — libere, sen helpo de instruisto. Ŝi verkis rakontetojn — en malbonega stilo — kaj ŝi kompostis ilin per nia presilo per ke tiuj tekstoj aperu sur la lerneja gazeto. Dum la libertempo ŝi povis fari kion ŝi volis. Mi donis al ŝi plenan liberon, ŝi havis apartan vivon. Tiu vivo tiel taŭgis al ŝi !

Kvar monatojn poste, la patrino de Gretel renkontis min : « Nia filino tute transformiĝis. Ŝi bone kaj memvole manĝas, ŝi ĉiam havas apetiton, ŝi bone kaj kviete dormas ; ŝi ĝojas iri al la lernejo kaj... ŝiaj ĝenoj en la vertebroj malpligrandiĝas. »

Sed vi certe diros al mi : « Se vi donas tiom da libero en la lernejo, *kiel vi povas plenumi vian devigan programon ?* » Mi respondas klare : « Mi konsideras *rigidan programon* kiel gravan baron por la disflorado de libero. » Ni bavaraĵ instruistoj (tion ni diras kun granda kontento kaj dankemo) havas la eblon limigi la oficialan programon. Tiu programo estas *kadro* kaj ni povas *elekti*. Sed malgraŭ tio ni devas ĉiam pensi : « Kiel doni al la gelernantoj ankoraŭ pli grandan liberon ? »

Skribante tion mi vidas du eblecojn : la liberan desegnadon kaj la presarton en la lernejo.

Mi gvidas la 6-an klason (*) kaj mi interŝanĝas infandesegnaĵojn kun Sud-Ameriko, Francio, Belgio, Italio. Ĉiam mi devas ree konstati : *La koncepto pri desegnado vere libera atingis ĝis nun tre malgrandan lokon en la praktiko.* Ĉie helpo kaj aliformiĝo flanke de la instruisto. Unue, tiaj desegnaĵoj estas senvaloraj por la psikologiaj observoj de la instruistoj. Due, ili malhelpas la lernanton, kiu

perdas okazon libere evoluigi sian personecon. La plej bonaj liberaj desegnaĵoj venas el Francio.

Rilate la presarton en la lernejo, mi estas kontraŭ ĉia ekspluatado de la tekstoj. En la ierneja gazeto eblas al ĉiu lernanto — eĉ la plej mallerta — presi kion li volas. Nenia helpo de la instruisto. La *libera* verkado ebligas al ni vidi la profundan psikan vivon de niaj glernantoj. Per ĝi ni konas la medion de la infano, la kaŝitajn edukantojn, la ĝojojn kaj malĝojojn, la ludojn de niaj glernantoj.

En tiu artikolo, mi povis nur supraj pri-trakti multon. Sufiĉas, ke la leganto komprenu. En teknika epoko, la infanoj riskas esti mezurataj, taksataj. Ni estas vokataj de nia instruista devo, ekzercian profesion, por ke niaj glernantoj iĝu homoj, homoj laŭ PESTALOZZI : « Oro kaj arĝento ne igas min atingi al kio mi estas. Mi estas per mia koro, ĉi-kio mi estas. »

(Trad. S-ino LE GOFF).

(*) 12-13-jaraj geknaboj.

15-year-old John will greet « La Urbestro »

Tiu titolo, super kvin kolonoj, aperis en la angla gazeto « *News-Pictorial* » : « 15-jara John salutas la urbestron. »

La kaŭzo de tiu artikolo estis la vizito de Dieppe al Grimsby. Ambaŭ urboj estas « ĝemeligitaj » en la kadro de la anglofranca amikeco.

Je tiu okazo la esperanto-kursanoj de la Popola Universitato de Dieppe komisiis ĝian prezidanton, S-ro GUESDON (neesperantisto) prezidanto de la Komitato « *Grimsby-Dieppe* », transdoni mesaĝon al iliaj junaj amikoj de Cleethorpes School.

La lokaj gazetoj, francaj kaj anglaj, detale raportis pri la oficiala vizito de la urbestro de Dieppe. El tiuj raportoj, ni citu :

El « *News-Pictorial* » : « ...15-jara John HOSTED alparolos la urbestron de Dieppe, marde vespere, en esperanto : « S-ro Urbestro, ni tutkore dankas vin pro la saluto, kiun vi afable alportis al ni... » Post sia alparolo John prezentos al la urbestro mesaĝon speciale ilustritan de Kenneth APPLEYARD (15-jara) ! »

« Tute dank'al esperanto, la knaboj de lernejo de Cleethorpes partoprenos en

Grimsby la bonvenan akcepton organizitan por la francaj gastoj. Antaŭ kelkaj monatoj, ili interŝanĝis salutojn kaj leterojn en esperanto kun la esperanto-kursanoj de la Popola Universitato de Dieppe. Kiam S-ro RÉTAUD, la franca Esperanto-instruisto, sciis, ke lia urbestro iros al Grimsby, li petis lin transdoni saluton al la Cleethorpes-amikoj... »

El « *Grimsby Evening Telegraph* » kaj el « *Les Informations Dieppaises* » : « ...Dum la akcepto, kiun partoprenis la anoj de la korporacio kaj iliaj edzinoj, la oficialuloj kaj reprezentantoj de la komercaj medioj, unu el la francaj gastoj, S-ro GUESDON, legis mesaĝon por la esperanto-lernantoj de Cleethorpes School. Tiun mesaĝon sendis la lernantoj de la Popola Universitato de Dieppe. »

« S-ro BIEZ, urbestro de Dieppe, ricevis paperrulon entenantan esperanto-mesaĝon por la diepaj lernantoj... »

Esperanto trovis sian lokon, eĉ en manifestacio organizita sub la signo de la anglo-francaj amikeco kaj dulingvismo. Ĝia valoro estas ĝia forto.

R. RÉTAULT.

Esperanto antaŭ la Eŭropa Konsilantaro

Komence de la aŭtuna sesio de la Eŭropa Konsulta Asembleo niaj s-anoj Dr. HERMANN, Lampertheim (Germanio), L. LAURAT, Parizo, kaj P. PETIT, Rosny-sous-Bois, ambaŭ el Francio, estis en Strasburgo kaj skuce ricevi la subskribojn de 14 delegitoj el Anglio, Francio, Germanio, Italio kaj Norvegio sub propono de nova rekomendo pri la lingvo-problemo. Por ke la Eŭropa Konsilantaro povu ekzameni, ĉu Esperanto eble donos elvojon el la lingvaj malfacilaĵoj, oni proponas kiel eksperimenton la oficialan instruadon de Esperanto en po unu klaso kun lernantoj de 11 ĝis 14 jaraj en Britio, Francio, Germanio, Italio kaj Neder-

lando. Post unu jaro de studado la lernantoj estu ekzamenataj en Strasburgo. La 25-an de oktobro konsiderinte la aferon la Konsulta Asembleo decidis sendi la proponon al la kompetenta Komitato por Kulturaj kaj Sciencaj Demandoj por prepara pri-traktado. La Konsulta Asembleo verŝajne jam dum la maja sesio 1956 definitive decidis pri la rekomendo. Ni esperas, ke estos eble dum tiu sesio montri ankaŭ la faman Esperanto-Ekspozicion de Montevideo en Strasburgo. Pri la plua evoluo de tiu tre grava afero la esperantista publiko ĝustatempe ricevos la necesajn informojn. Ni urĝe petas niajn gesamideanojn, ke ili ne ĝenu iun ajn oficialan instancon aŭ personon sen komision de la Ĝenerala Sekretario de U.E.A. D-ro LAPENNA aŭ de la gvidanto de la Eŭropa Kampanjo D-ro HERRMANN en Lampertheim (Germanio).

TRA NIA LITERATURO

Nia poezio

AL LA FRATOJ
(ekstrakto)

Tre malproksime ĉiuj ni staras
La unuj de la aliaj...
Kie vi estas, kion vi faras,
Ho, karaĵ fratoj vi miaj?

Vi en la urbo, vi en urbeto.
En la malgranda vilaĝo,
Cu ne forflugis kiel bloveto
La tuta via kuraĝo?

Cu vi sukcese en via loko
Kondukas nian aferon,
Aŭ eksilentis jam via voko,
Vi lacaj perdis esperon?

Forte ni staru, brave laboru,
Kuraĝe, ho nia rondo
Nia afero kresku kaj floru
Per ni en tuta la mondo.

ZAMENHOF.

Legindaj pagoj

ZAMENHOF, verkisto

Li ne estis hemiisto, astronomo, matematikisto, aŭ eĉ nur lingvisto, teorie diskutanta ĉe komitato. Li estis verkisto. De l'frua infaneco li montriĝis jam poeta. Arto lia estis la uzado de la vortoj. Harmonio kaj muzika sento ĝenerala lin inspiris por la lingvo kaj la stilo. Li hontis pri Esperanto ĝis tiam, kiam ĝi fluis tute dolĉe. Li ĝin eldonis nur tiam, kiam li sukcesis libere verki poemojn en la lingvo. Kiam ĝi aperis, la fundamenta materialo estis malpli la gramatiko, ol la tekstoj kaj la stilo. La dek-ses reguloj fakte nur tiriĝis el la lingvo jam uzata kaj provata dum longjaroj. Kiel ame li enblovis ĝian vivon kaj spiriton, tion oni povas ekkompreni per frazo lia: Konfidi al komitato krei lingvon, estus tiel sensece, kiel ekzemple konfidi al komitato verki bonan poemon. »

Jam Dante formis kvazaŭ propran lingvon el diversaj dialektoj de l'italaj regnoj. Iom simile Zamenhof eltiris la komunan elementon el dialektoj hindo-eŭropo-amerikaj por esprimi grandan penson pri frateco homa. La laboro kaj altiĝo estis ja pli grandaj. Tial ni ne miru, ke plejparto de l'genio elspezigis en la lingvo mem. Restis malpli multe por senmortaĵ bildoj aŭ impresaj kantoj. Lia propra verkaro estas malvasta, simpla, senpretenda. Tamen ĝi esprimas forte la sopiron de l'homaro. Tamen ĝi inspiris multajn.

Kelkaj prozaĵoj. Kelkaj poemoj, potencaj per sincero. Himnoj en la nomo de multaro. Faroladoj legitaj en kongresoj. Psalmoj de l'estonteco.

Aliaj homoj venos pli malfrue. Ili famigos Esperanton per verkoj jam pli riĉaj. Por ili ĉio estas preta. Tiel li esperis. Ankaŭ pri tio li montris sin humilas. Li pasigis longan tempon tradukante ĉefmajstrojn el diversaj landoj.

Jam Goethe parolis pri mondliteraturo Zamenhof deziris, ke homara lingvo valorigu tiun trezoron por ĉiuj popoloj.

Tial li, vesperon post vespero, nokton post nokto, laboradis sub la lampo pacience kaj fidele, por vivi en Esperanto « Hamlet » de Shakespeare, « Ifigenio » de Goethe », « Dandin » de Molière, « La Rabistoj » de Schiller, « La Revizoro » de Gogol. Lia bonega scio de l'hebrea lingvo lin ebligis majstre zorgi pri la Biblio. Lia Malnova Testamento belege superas la tradukojn en naciaj lingvoj. Per lia plumo ĝi refariĝis mirinda poemaro, kun ritmo de paroloj je ritmo de homvivoj sub okulo dia.

Ne nur senco, sed muziko, ne nur belsono sed vivo. La vivo, la impresoj de l'momento, la vigleco, la forta bato de l'esprimo; tio saltis, kuris, kaj rekantis en la stilo Zamenhofa.

Nenio pli simpla ol tiu lingvo. Nenio tamen pli viva kaj pli riĉa per uzado de l'interne forto disvolvigita. Post multaj jaroj tiuj tradukaĵoj restos ankoraŭ modeloj de lingvo ĉarma, juna, vivipova. Preskaŭ ĉiuj literaturoj en Eŭropo centra komenciĝis per traduko de l'Biblio. Tiu de Ufilas restas sola dokumento pri la Gota lingvo. Tiu de Luther signis epokon por la germana. Sur Slovaka flanko de l'Karpatoj, pastroj skribe fiksis la nacian lingvon per Evangelio. Prave Zamenhof deziris postlasi tiun tekston kaj diversajn verkojn de ĉefmajstroj, kiel parton ja necesan de komencanta fundamento.

De lia prozo originala mi jam citis multajn erojn. Tra ĝi brulis tiu fajro kaŝita interne en lia modesta persono. Tie montriĝis vigla rezonado, forta volo kaj obstino por konvinki per komparoj kaj logiko. Aludante la inspiron, la provadon, kaj la paciencon amon necesajn por ekfandi lingvon, Zamenhof ekzemple skribis:

« Al homo, kiu ne konas la esencon de muziko, ŝajnas, ke nenio estas pli facila. ol ludi fortepianon — oni ja bezonas nur ekfrapi unu klavon kaj estos ricevita tono, vi ekfrapos alian klavon kaj vi ricevos alian tonon, vi frapados en la daŭro de tuta horo diversajn klavojn, kaj vi ricevos tutan komponicion — ŝajnas, ke nenio estas pli facila. Sed kiam li komencas ludi sian improvizitan komponicion, ĉiuj kun ridego diskuras, kaj eĉ li mem, aŭdante la ricevatajn de li sovaĝajn sonojn, baldaŭ komencos komprenetadi, ke la afero iel estas ne glata, ke muziko ne konsistas en sola frapado de klavoj. Tiu heroo, kiu kun tia memfida mieno sidiĝis antaŭ la fortepiano, fanfaronante ke li ludos pli bone ol ĉiuj, kun honto forkuras kaj jam plu ne montras sin antaŭ la publiko. »

El « Vivo de Zamenhof ».
Edmond PRIVAT.

Demokratio, anarkio kaj rutinoj

Nova politika krizo aperas en Francio, multaj juĝas stulta tian situacion de regno kiu tre ofte ne havas registaron. Pri tiu krizaro oni juĝas kiel pri la krizoj kiuj ekzistas en aliaj homaj grupoj, eĉ se ili estas kulturaj. La plimulto diras: « kial la deputitoj ĉiam forpelas la francajn ministrojn » aŭ « kial Sinjoro X kaj Sinjorino Y ĉiam interbatalas? ». Mi memoras legajon pri futballudo rakontita de laiko en futbalreguloj. La raporto estas komika ĉar kiel 11 personoj disputas balonon al 11 aliaj por meti ĝin en kaĝon, por tuj poste ĝin remeti en la mezon de la tereno? Naive oni diras frenezuloj la futbalistojn aŭ la politikistojn same kiel tiujn, kiuj ĉiam malakordigas sur vojo al komuna celo.

Oni povas klarigi tion per analizo pli malpli supraj: iuj diras ke la Francio estas senpripensaj, aliaj ke la politikaj krizoj fontas el la kontraŭdiroj de kapitalismo, aŭ oni kulpigas la konstitucion, la partiojn ĝenerale aŭ iu partio speciale. Mi studos la problemon de la interno, laŭ mia sperto de vivo en organizoj kie oni provas starigi demokration. Mi nur aludos pri la principoj de la sistemo nomata demokratio ĉar mi supozas ke la legantoj jam konas la temon. Demokratio estas politika reĝimo kie la potenco apartenas al la tuta popolo. En malgrandaj grupoj la sistemo bone funkcias kiam la intereso estas komuna. Ĉiuj membroj pensas pri la sama temo, havas saman idealon; oni diskutas pri rimedoj, metodoj, kaj la diskutoj povas esti fruktodona. Sed tiu modela demokratio estas malofta. La unua malsano de la demokratio estas mallaboremo. Eĉ en malgrandaj grupoj, kiam homo sukcesas bone labori por la tuto, la aliaj fidas al li kaj faras nenion, atendas la rezultojn. La volontulo estas unue la servisto, sed vole nevole akiras majstrecon kaj fariĝas kondukanto. Kiam la grupo estas grava aŭ kiam la membroj estas disaj kaj ne konas unu al alian, aperas dua malsano: la nescio. Iu agas, la aliaj scias pri tio nur malrekte, kelkfoje nur per la raporto de la aginto. Kelkaj, kiuj nature estas fidemaj, kredas ĉion; aliaj, pro natura karaktero aŭ pro kontraŭa intereso, neas la raporton. Tiam la diskutoj fariĝas nubaj. En grupo mezgranda kiel povas esti esperantista movado, oni konstatas kiel grandaj estas tiuj du plagoj: la mallaboremo kaj la nescio, unu nurtranta la alian kaj reciproke. La tria malamikoj de la demokratio estas « memvido », tio estas vido laŭ persona aŭ partieca vidpunkto. Oni emfazas kutime pri la kontraŭstaro de la interesoj, sed ofte, kiam temas pri estonteco, kio kontraŭstaras ne estas la interesoj sed la konceptoj pri tiuj interesoj. La luktoj estas ne inter homoj laŭ situacio, sed laŭ la ideologioj, tio estas konceptoj pri tiuj situacioj. Mi ne deziras nun eniri la detalojn ĉar mi ne verkas libron, mi parolas nur pri la plej ĝenerala fenomeno de tiu kategorio kie partieca vido maskas la « ĝeneralan intereson » kiu laŭteorie devus esti la motoro en demokratia reĝimo. Cetere, mi opinias ke por homo, estas pli facile esti « kontraŭ » S-ro X aŭ la Y-a partio ol esti « por » iu klara programo. Estas en tio iu forto kiu dispelas la membrojn de la socio.

Tiuj tri malsanoj kondukas al malordo, al senmoveco, al anarkio laŭ la etimologia signifo de la vorto. Fakte, tiu malordo estas plimalpli grava laŭ la partioj. Kiam ne estas partioj, kiel ekzemple en la esperantista movado, ĉiu iras laŭ sia propra ideo, aprobas aŭ malaprobas plimalpli hazarde, laŭ onidiroj. En grupo kie estas pluraj centoj da membroj, nur kelkaj laboras kaj ofte iu detruas kion la alia konstruis. La amaso pagas kotizojn kiel oni almozdonas, sed tute ne zorgas pri la « publika afero »; kelkaj grumblias kontraŭ iu persono aŭ iu kategorio. Multe da energio estas perdita. Demokratio ne ekzistas, kelkaj estas estroj: aŭ ili fakte regas apogitaj de la blinda fido de la plimulto, kaj batitaj de la tradiciaj kritikoj de tiel blinda opozicio, aŭ ili ne havas sufiĉan forton kaj por ne malplaci, ili faras nenion. Oni tion nomis en Francio: « senmovismo », tio estas doktrino de la senmoveco. La popolo ne regas, ĝi sekvas la kondukantojn; kiam tiaj homoj ne ekzistas, la « movado », kiel oni diras en la esperantista mondo senmoviĝas. Ĉiuj esperantistoj scias ke tiel valoras la grupo kiel valoras la kondukanto.

En socio kie estas partioj, en sindikato kie estas tendencoj, tiu anarkio estas ordigita de la rutino. Tradicie, iu partio diras ion, tradicie, iu homo kredas al tiu partio, sed en la ĉiutaga vivo, oni ne plu pensas, oni nur sekvas la kutimon. Tiel oni kuracas la malsanojn, eĉ mallaboremuloj povas voĉdoni laŭ konsilo de partio (kompreneble, li ne ĉeestas kunvenojn kaj ne aligas la partion), eĉ nezorgulo povas konante nenion ripeteti kion li legis sur ĵurnalo. Mallaboremo kaj nescio ne gravas: per la rutino, per la sekvo de partioj kiuj ĉion klarigas, oni fariĝas ŝajna civitano. Eĉ memvido estas bremsata, ĝi fariĝas kolektiva, oni ne plu vidas laŭ persona vidpunkto, sed laŭ partia, klasa profesia perspektivo; ŝajna demokratio povas funkcii.

Mi konkludas tiujn rapidajn notojn per tiu paradokso: ne estas vera demokratio ĉar oni tro kredas al ĝi. Oni kredas al formoj kiel estas la universala voĉdono, la referendumo, la kongresoj, kvankam la realaj kondiĉoj ne permesas la funkciadon de tiu konstruaĵo. La opinio de la demokratio estas la kredo al kelkaj demokrataj mitoj. F. BOYET.

LA REDAKCIO publike dankas F-inon NIXON kaj S-ron BARONNET kiuj donacis respektive 2 kaj 36 kaje-rojn de la antaŭmilita Internacia Pedagogia Revuo. Tiel ni nun posedas la numerojn: 1930: 2/3; 1932: 1, 2, 3, 4, 6; 1933: 1, 2; 1934: 1, 2; 1935: 1, 2, 3, 4, 5; 1936: 1, 2, 3, 5, 6; 1937: 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7; 1938: 1, 2, 3, 4, 5, 6; 1939: 1, 2, 3.

La celo estas arigi la plenan kolekton de I.P.R. kaj de la antaŭa « Novaj Tempoj » kaj poste ĝin bindigi. Tio konsistigos kolektivajn posedadojn en la servo de la Redakcio de la nova I.P.R. kaj eventuale de niaj diversaj instruitaj asocioj.

Kiu plu helpos?

Sendu al D-ro A. ALBAULT, 11, rue des Feuillants, Toulouse, Francio.

KONKURSO

Nova Regularo.

1° Tiun konkurson rajtas partopreni ĉiuj anoj de G.E.E. aŭ abonintoj al « Esperanto et Culture » kaj ĉiuj abonintoj al « Internacia Pedagogia Revuo ».

2° Ilia partopreno estas senpaga.

3° Por ĉiu ĝusta solvo estos aljuĝita(j) poento(j).

4° Kiu havos 25 poentojn sume, tiu rajtos fari senpagan menĉon de 300 frankoj ĉe la Libro-Servo de G.E.E.

5° Sendu la solvojn al S-ro Guillot, Cours de la 4^e République, Gaillard (Haut-Savoie), Francio.

I-a KONKURSO

Gajnintoj : F-ino Deygas, S-ro Génuit, S-ro Harmegnies, S-ino Lemoine, S-ro Pallard, F-ino G. Preux, F-ino Texier, S-ro P. Tronet gajnis 2 poentojn.

Ni gratulas ĉiujn.

2-a KONKURSO

Jen la solvo : Horizontale : 1. Spiritalismo ; 2. Donaci ; 3. Nt, diro, fs ; 4. Ter, ci, ole ; 5. Iras, femur ; 6. Murdo, naiv ; 7. Era, ro, rda ; 8. Ne, adzo, an ; 9. Prio-ro ; 10. Ortografio.

Vertikale : 1. Sentimento ; 2. Terure ; 3. Id, rara, pt ; 4. Rod, sd, Aro ; 5. Inic, ordig ; 6. Tarif, ozor ; 7. Ico, en, ora ; 8. Si, omar, of ; 9. Fluida ; 10. Observanto.

Gajnintoj : F-ino Arnould, S-ino Bellier, S-ro Bonamy, S-ro Chevalier, F-ino Deygas, Ges-roj Lanz, S-ino Lemoine, S-ro Le Seach, S-ino Pallard, F-ino Robin, S-ro Tronet, S-ro Vivien, S-ro Bourry, gajnis 2 poentojn.

F-ino Forest, S-ro Génuit, S-ro Harmegnies, F-ino Joubert, S-ro Le Coze gajnis 1 poenton.

Korajn gratulojn al ĉiuj.

Post tiu dua konkurso, S-ro Bonamy gajnas 300 frankan libron.

Apartajn gratulojn al la gajninto.

4-a KONKURSO

Silab-enigmo :

a al bo ĉa ĉo do do fa fra go go gro gu ka ka ka ko ko ko kra kro la la la ma me mo mo mo na no no no no no no os po ra ran ren ri ro ro so te ten to to to to to tra.

1° — El la supraj 56 silaboj formu 28 dusilabajn vortojn, kun la sekvantaj signifoj : 1. Speco de ŝnuro el brulebla materio ; 2. Malgranda ero ; 3. Hejma kvarpieda besto ; 4. Vasta etendaĵo de sala akvo ; 5. Marherbo ; 6. Amfibia vertebrula besteto ; 7. Ĉirkaŭa parto de io ; 8. Natura gumo ; 9. Pagilo ; 10. Kalkeca substanco ; 11. Aparato kiu ebligas elfluadon de fluaĵo ; 12. Planedo ; 13. Ano de religia ordeno ; 14. Kapvesto ; 15. Hararo kovranta la korpon de kelkaj bestoj ; 16. Loĝejo por sportistoj ; 17. Omnibuso ; 18. Legomo ; 19. Muskola organo ; 20. Monkesto ; 21. Etendaĵo de akvo ; 22. Interpunkcia signo jara profito ; 24. Kunplektaĵo el floroj ; 25. Kulturebla kampo ; 26. Alta herbo ; 27. Deviga religia ceremoniaĵo ; 28. Nenormala malgrandegulo.

(Vi ricevos unu poenton por bona respondo al tiu unua parto).

2° — El ĉiu trovita vorto elprenu 2 sinsekvajn literojn (ne silabo), kaj tiel formu frazon. Vi ricevos esperantistan konduktivon. (Vi ricevos 2 poentojn por bona respondo al tiu 2-a parto).

Bonvolu sendi viajn solvojn ĝis la 25-a de Februaro al S-ro GUILLLOT, Cours de la 4^e République, Gaillard (Hte-Savoie).

POR VIA DISTRO

KRUCVORTOJ N° 3

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10

1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

(r) : nur radikalo

Horizontale.

1. Diserigi.
2. Estro de monaĥejo ; Korekta sed malofta formo de nedifinita pronomo.
3. Plialtigi (r) ; Kapo de parazita insekto ; Apartenanta al iu.
4. Fonetike : parto de korpo ; Nekonfuza ; Fonetike : parto asignita al iu per sorto.
5. Parto de okulo.

6. Sursultra ornamajo (r).

7. Fonetike : Parto de plugilo ; inverse : parto de ŝipo ; Fonetike : granda ŝtono.

8. Moviĝi de iu loko al alia ; Fonetike : efko de io ; Stato de Homaro, kiun celas Esperanto (r).

9. Patrujo ; Ne plu teni.

10. Oficisto direktanta gravajn publikajn servojn.

Vertikale.

1. Montri al iu, ke li ne devas fari ion.

2. Insekto (r) ; Aparato por ebligi elfluadon de fluaĵo (r).

3. Purigi (r) ; Prefikso montranta ripeteton ; Participa finaĵo (r).

4. Fonetike : Malgloro ; Filo de la filo ; Prepozicio montranta la posedanton.

5. Vigla kiel infano.

7. Prepozicio signifanta disdividon ; Komenco de mallonga rakonto ; Artikolo.

8. Nedifinita pronomo ; Participa finaĵo ; Mangaĵo (r).

9. Gravurita desegno, kies entaĵojn oni plenigas per nigra emajlo (r) ; Kunlektaĵo fojnjon (r).

10. Tuto de ordonoj, donitaj de superulo al subulo.



La Esperantista Kulturdomo

Kastelo « GRÉSILLON »
BAUGÉ (M.-et-L.) Francio
Tél. 34

Akceptas dum la somero ĉiulandajn esperantistojn, kaj eventua-
iam ajn karavanojn frue anoncitajn.

- Por trankvile ripozi en frateca atmosfero ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;

Venu al Esperantista Kulturdomo

Bela, komforta kastelo ; milda klimato ; agrabla regiono ; amikeca ren-
jen ĉio-ĉi atendas vin en nia feri-restadejo.



**Antaŭa enskribigo nepre necesa ; frua peto por
litrezervo konsilinda.**

*Informpeto sendota kun internacia respondkupono al :Esperantista Kulturdomo,
Kastelo « Grésillon », Baugé (M.-et-L.) Francio.*